# LA PERMANENTA REVOLUCIO

ORGANO DE LA

BOLŜEVISTOJ-


LENINISTOJ.

PROPAGANDAS LA

IV-AN INTERNACION

SOLA TEORIA MARKSISMA

ORGANO EN ESPERANTO.



ANSVARHAVENDE Aage Kjeldsö. Helsingör, Danmark. TRYK Sv. Johannsen, Kbh.
PREZO 0,20 dkr por unu kajero, APERAS monate, ABONO por 1 jaro 2,40 kr.
EDITITA de la Propaganda Komitato de Leviĝu, konsente de I.K.L.
ADRESO Svend Johannsen, Danio, Kopenhago, Australiensvej 24. (Esperanto)

DUA JARO.

KVARA KAJERO............UNUA EDITO..........KOPENHAGO........1936

EN LA ENHAVO:

LA KVARA INTERNACIO K LA MILITO. Dua parto.
(la nacia defendo, la defendo de la demokrateco, la def. de la netralaj ŝtatoj, Sovetio k la milito, la dua k tria internacioj k la milito, la centrismo k la milito.)
ESENCO K SIGNIFO DE LA SENNACIISMO.
(historio - ruĝa faŝismo - nacia problemo = hist. mater.)
LA STAĤANOVMOVADO EN SOVETIO.
(Gia reala signifo k burokrata degeneriĝo, kreskanta diferenciĝo en la laborista klaso, kaŭzoj k sekvoj.)

KAJ ALIAJ. La komencon de "La kvara int. k la milito" ni sendos volonte al interesitaj kamaradoj skribmaŝine, kontraŭ 1 int. poŝta r.kup. Pro manko de spaco ni ne povas doni la kutiman artikolon pri la sepa mondkongreso, ĝi estas represota venontan fojon. SENDU MONON!

PROLETOJ ĈIULANDAJ, UNUIĜU!

## LA STAĤANOV-MOVADO EN SOVETIO.

Ĝia reala signifo k ĝia burokrata degeneriĝo.

En la nokto antaŭ la 31.aŭgusto tralaboris la ministo en Donbas,Aleksaj Staĥanov,juna,29-jara laboristo dum ses horoj 102 t karbo,per la kompresaermartelo anstataŭ la kutima meza laboro de 6-7 t.(Dum en Eŭropo estas la plej bona meza laboro ekz.en Polio,Rurdistrikto,10 t,la pleja rekordo 16-17 t).Depost ĉi tiu tago ekzistas la "Staĥanovmovado".
Baldaŭ poste estis la sovetia gazetaro plena de komunikoj pri aliaj rekordoj.La forĝisto Busigin,en Gorki,forĝis 112-117 pecojn pohore (la forĝistoj de la Ford-fabriko forĝas 100 tiaj pecaj en unu horo). Je la radfabrikado laboris "Staĥanovulo" 12 parojn anstataŭ 6(la normo).Oni eĉ baldaŭ plialtigis la rekordon - unue per 15,poste per 17 k fine 18 paroj.En la Uralo,en la kuprominejoj,laboris Ivanĉikov 970 % de la normo,t.s.li laboris dum la sama tempo la dekoblon de la normo.Li salajris dum ĉi tiu tago 320 rublojn,t.e.sumo kiu estas preskaŭ la duoblo de la monata meza salajro de sovetia laboristo!
En la Krivoroĝski-karbdistrikto,sukcesis al Staĥanovlaboristo transiri la normon komence je 2300 %,poste je 2500 %.La rekordo de Staĥanov mem baldaŭ estis transirita - la ministo Gorbatjuk ellaboris dum unu laborintervalo 405 t da karbo, k kelkajn tagojn poste ricevis la hakisto Borisov preskaŭ 800 t,per kio li transiris ĉiujn rekordojn k superis la normon per la 46-oblo!
Fantaziaj nombroj!Ni esploru ĉu ili estas realaj,kio estas la kaŭzoj de ĉi tiuj rezultoj k per kiuj rimedoj oni atingis ilin.
Unue,sur kiuj ĝeneralaj premisoj bazas la Staĥanovmovado?En la lastaj jaroj kreskis la sovetia industrio nekredeble,ĝi estis pliriĉigata per nova evoluita teĥniko.Sed ĝis nun oni rimarkis la kreskadon de la la sovetia industrio nur en la laŭkvantaj rezultoj.Senĉese kreskis la nombro de la maŝinoj,sed la utiligo de ĉi tiuj maŝinoj(en laŭkvanta k laŭkvalita rilato)preskaŭ ĝis la antaŭa jaro ne multe plibonigis.Per aliaj vortoj,la ekzistanta teĥniko laboras sur tre malalta nivelo,ĝi donis nur etan parton de tio kion donas la sama teĥniko en Eŭropo k Ameriko.K nur ĉi tiu treege malalta nivelo de la utiligo de evoluita teĥniko ebligis tian mirigan rezulton.Se motoro kiu povas fari mil turnojn en 1 min.,nur faras cent,tiam estas sub normalaj kondiĉoj ne malfacile lasi ĝin fari mil turnojn,sed estas tre malfacile - k ne ĉiam sendanĝere - lasi ĝin fari ekz.1050 turnojn.La motoroj en Sovetio havas tre malaltan rapidecon de rotacio.
Ĉi tiu niveldiferenco inter progresa teĥniko k ekstreme malalta utiliggrado fariĝis en la sfero de la produktado la premiso por la Staĥanovmovado.
Ni rigardu la propran laboron de Staĥanov iom pli detale.St.rakontas ke hakisto laboras ne pli ol maksimume 3 horojn ĉe la kompresaermartelo,la ceteran tempon li faris helplaboron k la martelo restis neuzita.Nun laboras la martelo de Staĥanov dum la tutaj 6 horoj(anstataŭ 3)k la helplaboron faras aliaj laboristoj.Per aliaj vortoj, oni enkondukis elementan laborpartigon.Oni enkondukis ankaŭ aron da aliaj plibonigoj en la laborprocezon,la kapablo de la laboristoj pligrandiĝis ktp.La pli granda kvanto de helplaboristoj postulis tamen,fari grandajn korektojn ĉe la rekordoj,kion Ordjonikidse antaŭ la St.-kongreso,kiu okazis antaŭ nelonge en Moskvo,konfesis. "Oni kredas kelkfoje,ke unu homo sukcesis ellabori 102 t.Tio ne estas vera.Tuta brigado(=laborkolono)donis 102 t."Se oni dividas la ellaboritan kvanton per la nombro de la laboristoj en la brigado, tiam ni ne ricevas la ciferojn 100 k pli t por unu laboristo ,sed maksimume 30-35,tio estas rilate al la pli fruaj labormaksimumoj de 14 t certe granda sed multe malpli miriga plialtiĝo de la laborproduktadkapablo.
Alian,tre gravan kaŭzon de la rekordoj oni serĉu en tio ke ĉi tio ne temas pri meza labortago kun normaj laborkondiĉoj sed pri speciala labortago kies specialaj favoraj kondiĉoj ofte dum longa tempo estas preparataj.Oni aldonu ke la rekordulo laboras per nekutima energio,kiun li dum longa tempo ne povas elteni.(Ne estas seninterese noti ke ekzistas en la Staĥ.-brigado speciala funkcio de laboristo kiu anstataŭigas la laciĝintajn laboristojn,funkcio do,kiu premisas eksterordinaran laciĝon de la laborforto.)La plimulto de la rekordoj estiĝis sub ĉi tiuj specialaj artefaritaj kondiĉoj helpe

de treega streĉiĝo.
Plejmulte havas la rekordoj nur la karakteron de unufojeco.Ekz.menciis Ordjonikidse antaŭ la Staĥanovkongreso(nov.35)prezentante la staĥanovulon kiel eksterordinaran fenomenon,"ĉi tiu kamarado faris rekordojn ne dum du tagoj sed dum tri monatoj."Tion,kion staĥanovulo hodiaŭ atingas,li morgaŭ ne povas atingi.La ĝenerala senordo en la produkalo,la multaj misproporcioj en la fabrikoj,en la div.branĉoj de la in..strio,ktp estas la ĉefaj kaŭzoj de tio.La brigado de la staĥanovulo Saĥorukov ellaboris je unu tago 150 t da karbo,je la alia 80 t ktp, l.. tia febreca kurbo.(Trud,23-10-35).La brigado de la staĥanovulo Ivnkov ellaboris je unu tago 80-90 t da karbo,je la alia nur 8 t,poste ree 92 t,k je la posta tago falas la produktado al 20 t.("Trud",9-10).Kiel kaŭzojn indikas la gazetoj malbonajn rilatojn inter la unopaj eroj de la produktadprocezo,pro la malbona stato de la motoroj, malbona laboro de la transportbando ktp,ne malofte ankaŭ trolaciĝon .. la staĥanovuloj je la antaŭa tago.En la Lenin-a Lokomotivfabriko "..ontriĝis la sukcesoj de la staĥanovuloj ne kiel daŭraj,Jam post ..lkaj tagoj malaltiĝis la sukcesoj de la laboristoj.Nun ekzistas ..goj kiam ili eĉ ne atingas la normon."("Trud",1-11).Esploro kiun oni aranĝis ĉe 20 ministoj,kiuj ne atingis la normon,rezultis ke oni nur povis unu de ili kulpigi je mallaboremo,je la neatingo de la aliaj kulpis la neorganizitoco de la produktado k aliaj teĥnikaj kaŭzoj.En "Trud" de la 2-11 estas interesaj eltiraĵoj el la diario de Staĥanovministo.El ĉi tiu taglibro oni povas vidi ke la verkinto dum la tempo de 15 tagoj nur laboris entute du tutajn tagojn,5 tagojn li laboris tute ne k la aliajn nur parte,oni tiam ŝovis lin de unu laborejo al la alia la maŝino ne laboris,aŭ la laboro ne estis preparita,aŭ ne ekzistis ligno por subteniloj,aŭ ne ekzistis sufiĉe da vagonetoj ktp.La rekordulo kiu flanke de Staĥanov atingis la plej grandan gloron,la jam menciita Busigin,estas en la sama situo.Ankoraŭ dum la gazetoj kriis lian gloron en la mondon - li ja superis la Ford-laboristojn - oni devis konstati ke li jam je la veninta tago "ne povis labori per sia tuta forto ĉar la martelo ne estis sufiĉe preparita",("Pravda",23-11 k 24-11)En tia situo estas unu el la plej famaj Staĥanovlaboristoj,kiu laboras sub specialaj privilegiaj kondiĉoj!Busigin "starigis la tutan departementon sur la kapon",B.deklaras "mi devas multon kritiki,oni devas kelkon alikonstrui",ktp.Tion povas Busigin al si permesi,sed ĝenerala laboristo ne rajtas malfermi la buŝon.La estraro komprenebla timas tiajn rekordulojn,permesas al ili speciale favorajn laborkondiĉojn,priservas ĉefe ilin.Ne estas malfacile prezenti al si la situon de ĝenerala staĥanovulo kiu ne estas staĥanovulo.Eĉ "Trud" petas:Oni ne nur okupigu sin pri laboristoj kiuj jam atingis rekordojn!
Ni ree vidas la tutan nerealecon de la rekordoj de Busigin,- kiel ankaŭ tiujn de la aliaj rekorduloj - kiuj onidire superis la amerikajn normojn.Se sukcesis al Busigin,kelkfoje forĝi 127 genupecojn en unu horo,k la forĝistoj ĉe Ford faras 100,estas la diferenco en tio ke la lastaj ilin faras en ĉiu horo,hieraŭ,hodiaŭ k morgaŭ,per aliaj vortoj ke tio estas la meza amerika standardnormo,k ne rekordo.Sed Busigin fabrikas en unu horo 127,dum li en la alia horo eble ne fabrikas eĉ unu pecon.
Ĉirkaŭ la rekordoj nun ekzistas granda konkurencado.La teksistino sciigas al la Staĥanovkongreso,ke ŝi intencas,transiri al 150 teksiloj.La rekordlaboristinoj de Vinogradov alkrias al ŝi:"k ni transiras al 208!"(Oni ridas k klaĉas).Tiaj faktoj abundas,k la gvidantoj de la kongreso provas zorgeme evolui ĉi tiun "sportecan" spiriton,ili spornas ktp.Estas superflue priparoli,ke ĉi tiu konkurencado,kiu akompanas la Staĥanovmovadon,estas tute malsana fenomeno,al kiu la amaso de la sovetiaj laboristoj ne nur sin sintenu malaprobe sed eĉ malamike.Lenin iam diris pri la rekordoj de la usona raciigo:"En la kapitalismo torturo aŭ artaĵo."Elementoj de "torturo aŭ artaĵo" ankaŭ ekzistas en la sovetiaj rekordoj.
Ni jam menciis ke la rekordoj ne estas tipaj por la plialtiĝo de la ĝenerala laborproduktadkapablo.Ni volas per la ekzemplo de la minejo de Staĥanov montri,kiel malmulte ili entute influas la mezan laborproduktadkapablon.En ĉi tiu minejo laboras krom St.ankoraŭ tuta aro da rekorduloj kiuj lin superis.La minejo donis en okt.8 120 t da karbo,en septembro 8 063 t,do kreskon de nur 0,7 %.Sed se oni ne nur pritraktas la elhakitan kvanton,sed ankaŭ la transporton de la karbo

ĝis kiam ĝi estas enigita en la vagonon, tiam estas la kresko eĉ pli malalta. En aliaj branĉoj de la industrio estas la situo simila. Aliflanke oni devas konsideri ke la St.-movado nun nur estas ankoraŭ en la komenco.

KIAL LA STAĤANOVMOVADO ESTIĜIS!

Cu oni povas konkludi el tio ke la staĥanovmovado estas (ne kiel unuopaj rekordoj sed kiel movado por levi la laborproduktkapablon) "blufo" sen perspektivoj? Tute ne! Ni supozas, ke la movado, puriĝita de rekordemo, havas grandan estontecon. Ni provu montri la plej esencajn kaŭzojn por tio.

Ni montris kiel kaŭzon de la eblo de la estiĝo de tia movado la malbonan utiligon de la nova, ofte potencega teĥniko. Ni montris aliflanke ke oni devas kritike pritrakti la rekordrezultojn. Restas ankoraŭ grava demando: kial ekestiĝis ĝine de 1935 "subite" la staĥanovmovado? Kio estas la iniciatinto? Kial ĝi ne estiĝis ekz. unu aŭ du jarojn pli frue? Tiam ja jam ekzistis la altnivela teĥniko. En parolado, kiu estas eble el la plej malprofundaj kiujn li iam faris, diris Stalin la jenan klarigon por ĉi tiu fenomeno: "La vivo fariĝis pli bona, pli gaja. K se oni vivas gaja, estas la laboro pli facila." ("Pravda", 22-11). La afero do estas tre simpla: la sovetia laboristo pligrandigas la produktadon pro la "gajeco", por kiu lin feliĉigis kompreneble la sama Stalin. Kontraŭe Molotov, kiu demandis preskaŭ ĉiu paroladanton pri la kaŭzo pro kiu li ĝuste nun k ne pli frue laboris laŭ la staĥanovmetodo, donas pli realan opinion: "Multloke estis la direkta ekpuŝo por la pli alta laborproduktadnivelo la simpla intereso plialtigi la salajron." La Amerikon, kiun Stalin ne ektrovis, ektrovis honteme Molotov.

Tra ĉiuj gazetaj komunikoj, tra ĉiuj paroladoj de la staĥanovukoj estas ekkonebla ruĝa fadeno - la persona materia intereso. Tio estas la ĉefa instigiko de la staĥanovmovado, precize tio, k nur tio, certigas al ĝi nekontesteble kreskon en la estonto. Ĉi tiuj kondiĉoj de la persona intereso estiĝis nur en la lasta tempo, ili rilatas kun la kurso stabiligi la rublon, likvidigi la rajtigilsistemon entute k ĝenerale la normitan vardistribuadon. Ankoraŭ antaŭ malmultaj monatoj ludis la monsalajro en la buĝeto de laboristo negravan rolon, ĉar la salajro neadekvante bazis sur nepublikaj distribuejoj, fabrikkantinoj ktp, sed sub la novaj kondiĉoj, kiam la rublo ree fariĝas al "ĝenerala ekvivalento" de la varoj, - kompreneble al tre nekompleta k ne tre fidinda ekvivalento - ricevas la sovetia laboristo en la batalo por pli alta salajro instigon por levi la produktadgradon, ĉar la akord-pecsalajro kiu estas ĉie en Sovetio enkondukita kiel ĝenerala, aŭtomate esprimas la leviĝon de la produktado en rubloj. La jam depost longa tempo enkondukita laŭpeca salajrigo fariĝis al la ĉefa formo de la salajrigo en industrio k transporto, eĉ en tiuj branĉoj, kie tio faris malfacilaĵojn pro la kolektiva (brigadeca) karaktero de la laboro.

En la karbindustrio ekz. ja jam ekzistis akordsalajro, sed parte la t.n. brigado-akordsalajro, t.s. la brigado ricevis la salajron por la tuta brigado, laŭ la de ĝi atingita laboro, sed la salajro estis laŭ ĝenerale samgrandaj partoj dividataj. Nun oni ankaŭ ĉi tie transiras al la diferencakordsalajro (tion oni verŝajne baldaŭ enkondukos ĝenerale), t.s. ĉiu laboristo salajros laŭ sia produktado.

En la sama grado en kiu la nova teĥniko estigis la premisojn por la staĥanofmovado, ekviviĝis la laŭpeca salajrigo sub la kondiĉoj de la monreformo ĉi tiun movadon. En la antagonisma sovetekonomio, kun elementoj de kaj socialismo kaj kapitalismo, estas la staĥanovmovado ne nur ekonomie necesa sed ankaŭ en certa senco (pligrandigo de la laborproduktadkapablo) eĉ progresa. Kompreneble ne kiel "Preparigo de la kondiĉoj por la transiro de la socialismo (?) al la komunismo (!!)" (Stalin, en Pravda de la 22-11) sed ĝuste en la kadro de la ekzistanta antagonisma transira ekonomio kiel preparo de la plej elementaj premisoj por socialisma socio helpe de kapitalismaj metodoj. Antaŭ la nuna epoko oni neniam kalkulis monon k laŭpecan salajrigon al la kategorioj, de la socialismo, ankaŭ ne al tiuj de la komunismo. La laŭpecan salajrigon nomis Marks tiun kiu "plej bone konformas al la kapitalisma produktado". (La Kapitalo). K nur senhonta burokrato povas tiun devigitan devion de la onidire jam enkondukita "socialismo" mono k laŭpeca salajrigo, k tiel al pligrandiĝo de la neegaleco, nomi la "preparon de la transiro al la komunismo".

KRESKANTA DIFERENCIĜO EN LA LABORISTA KLASO.

La enkonduko de la akordsalajrigo gvidas neeviteble al profunda dif-

erencigo en la vicoj de la sovetia lab.klaso. Ĝis nun oni retenis ĉi tiun diferencigon per la normita distribuado - vivrimedrajtigiloj, fabrikdistribuejoj, kantinoj - sed nun sub la kondiĉoj de la transiro al la monekonomio estas al ĝi malfermitaj ĉiuj pordoj. Apenaŭ ekzistas en iu kapitalista lando tiaj grandaj diferencoj en la salajroj de la laboristoj kiel hodiaŭ en Sovetio. Ministo, hakisto, nestaĥanovulo, salajras maksimume 400-500 rublojn, staĥanovulo pli ol 1 600 rublojn... helplaboristo, ĉevalgvidanto en la mino, ricevas entute 170 r. (nestaĥ.) k 400 r. staĥanovulo - t.s. la unua laboristo ricevas la dekoblon de la alia. Sed 170 r. estas tute ne la plej malalta salajro, ĝi nur estas meza laŭ indikoj de la sovetia statistiko. Ekzistas laboristoj kiuj nur ricevas 100-150 r. La lab. Koslov en Gorki ricevis por la duono de oktobro 950 r., t.e. pli ol 11½foje pli ol tio kion ricevas la ĉevalgvidanto. La de ni menciitaj ekzemploj ne havas limon laŭ ambaŭ direktoj. La staĥanovteksistinoj ricevas 500 r, k pli, la aliaj 150 r, k malpli. Ne estas malfacile montri, ke la salajroj de la privilegiitaj tavoloj de la lab.klaso (lab. aristokratio) proporcias al la salajroj de la aliaj tavoloj kiel ekz. 20:1, eble estas la proporcio ankoraŭ pli granda. Se oni ankaŭ pritraktas la specialistojn, estas la bildo direkte danĝera. La ĉefinĝeniero de iu mino, kiu plenumis la planon bone, Ostrogljadov, ricevas 8 600 r. monate, k li, eĉ nur estas ĝenerala, ne iu eminenta specialisto, lia salajro do ankaŭ ne povas esti rigardata kiel eksterordinara. Ofte salajras la specialistoj pli ol la centoblon de tio kion ricevas la nekvalifikitaj laboristoj. K tian neegalecon oni atingis nun, 18 jarojn post la oktobra revolucio, dum la - laŭ Stalin - "transiro de socialismo al komunismo".

Oni devas ĉi tie ankoraŭ mencii kelkajn aliajn privilegiojn de la staĥanovuloj: Preferita havigo de libera restado en rekreaciejoj k sanatorioj, renovigo de la loĝejoj, lib. (senkosta) restado de la infanoj en infangardejoj, ("Trud" 23-10), senk. biletoj por la kino, libera razado ekster la vico (Donbas, "Trud", 1-11) senkostaj privatinstruistoj por la staĥanovuloj k ties familioj, ("Trud", 2-11); la rajton je libera medicista kuracado tage k nokte ktp.

Ni opinias ke la Stalin-gvidantaro havigas al la staĥanovuloj privilegiitan situon ne nur kun la celo instigi la levon de la laborproduktkapablo, sed ankaŭ por konscie pliigi la diferencigon en la lab. klaso, kun la politika celo, bazi sin sur mallarĝa, sed des pli fidinda fundamento - la laborista aristokrataro.

La kreskanta diferencigo en la laborista klaso, kristaliĝo de la privilegiitaj pintoj, de la lab. aristokrataro, ankaŭ pliakrigas terure la internajn antagonismojn en la lab. klaso mem. Oni do ne miru, ke la sovetiaj laboristoj akceptas la novan movadon tre malamike. Tion povas ankaŭ la sovetia gazetaro ne kaŝi. Ĉi tiu malamikeco alprenas diversajn formojn, de spritaĵoj k mokado ĝis murdoj, ĉe la mokado eĉ partoprenas la plej malsupraj oficistoj de la partio k sindikatoj, k komunistaj laboristoj ("Trud", 3-11).

La gvidantaro alvokas al la batalo kontraŭ la sabotuloj. La stalina vazalo en la Ukraino, Postiŝev, deklaras: "La batalo kontraŭ la sabotuloj k malamikoj de la st-movado... estas nun la plej grava regiono de la klasbatalo." ("Pravda", 13-11) La reprezentanto de Stalin en Leningrado, Ĵdanov, diras pri tio: "La st-movado trafis en kelkaj entreprenoj je kontraŭstaro,...la partio provos ĉion por neniigi tiujn kiuj sin kontraŭas al la venko de la st-movado.." ("Pravda", 18-11).

Ĉu ĉi tiuj minacoj influos la laboristojn? El la pli malsupre indikataj eltiraĵoj ni vidos, ke la laboristoj ne emas, senbatale malkontraŭi kie temas pri iliaj vivinteresoj.

"Trud" de la 18-11 komunikas, ke "en la kvina mino la hakisto Kirilov batis la minestron ĉar ĉi tiu postulis de li ĝustan terfortigon post la staĥ.-lab. samstejov". Temas pri tio ke la apliko de la st-metodoj en la minoj gvidis al tio ke oni maldungis la hakistojn (ekz. en la mino de Staĥanov mem malkreskis ilia nombro de 36 al 24). Certe ili ne iariĝos senlaboraj, sed ili devas transpreni pli malbone pagitan helplaboron, ekz. terfortigon por lignotraboj. En tia situo estis ankaŭ Kirilov. En la sama numero de Trud oni rakontas, kiel du lab. faris "malican agitadon kontraŭ la st-metodo. Plue en Odeso, en la fabriko por konstruo de grandaj maŝinoj batis la lab. Poljakov la staĥanovulon Korenoj per granda ŝtono. En Mariupol minacis du lab. el la fabriko Asovstal, ĉist-

jakov k Romenko,iun staĥanovulon,lin mortigi.En la fabriko "Krasni stampoŝvik"trovis la staĥanovulino Belaja sur sia teksilo betulbranĉon(por bati)kun slipo:"Al K-dino Belaja oni donacas por la plenumo je triobla normo floraron."("Trud",1-11)Daŭris 6 tagojn ĝis kiam oni estis konstatinta la kulpulojn.Inter ili estis ankaŭ Muraĵev,la organstro de la sindikato."Trud" de la 12.11 komunikas ke la teksistoj kiuj laboras pli multe k pli intensive,trafas je grandaj malhelpaĵoj. "De paŝo al paŝo oni estas memorigata je la klasbatalo(!)"."Istvestija"de la 28-10 komunikas ke en la barako 25 de la kartonaĵfabriko en ...skvo la laboristoj Holmogorov (patro k filo)riproĉis al la Staĥanovulo Solovin,ke pro lia laboro oni altogos la normojn.En "Pravda" de la 31-11 estas rakontata,ke en Smolensk"la neprogresaj laboristoj komencis malŝati la staĥanovlaboriston Liĥoradov.La afero evoluiĝis tiel ke iu Sviridov rompis la drivradon k disŝiris la rimenon ĉe la laborbenko de Liĥoradov."Liĥoradov mem rakontas(Pravda,17-11)"Kiam ... estis farinta 7 radarojn (li do estis transirinta la normon)staris ... tuta departemento sur la kapo.La malamikaj elementoj estis tute ...taj min manĝi."

... laboristoj kiuj kontraŭas al la st-movado estas de la sovetiaj gazetoj nomataj "Havarianoj",kiuj favorigas havariojn k rompon de la meĥanismoj."Havarioj k rompigoj estas ŝatataj rimedoj en la batalo kontraŭ la st-movado"(Trud).La "Pravda" de la 3-11 komunikas ke en Tambov 4 st-laboristoj rimarkis "kiam ili venis en la laborejon,ke iliaj laborilujoj estis perforte malfermitaj k iliaj laboriloj ŝtelitaj."

La akrecon de la batalo pruvas ankaŭ la fakto,ke en kelkaj,feliĉe maloftaj kazoj la batalo alprenas la karakteron de terorismaj agoj. "Je la vespero de la 25-a de okt.oni mortigis la plej bonan udarnikon la ŝlosiston de la fabriko "Trud",I.Ŝmirev...Oni arestis la krimulojn" (Pravda,29-10)Kelkajn semajnojn pli poste oni komunikis en la Pravda, ke la "militjuĝejo kondamnis la mortiginton de la staĥanovulo Ŝmirev al mortpafigo".En la mino Ivan en Makeev oni murdis la plej bonan staĥanovulon Nikolaj Ceĥnov,"por saboti la tansiron de la distrikto al la staĥanovmetodo".(Isvestija,30-10 k 2-11).

Ni jam menciis,ke la staĥanovuloj ofte laboras je la kostoj de siaj kolegoj."Trud" de la 23-10 komunikas "La staĥanovulo estas superŝutita de laboro dum lia najbaro povas fari nenion."K aliloke "La sukcesoj de la staĥanovuloj postulis la maldungigon de la laboristoj en kelkaj distriktoj,komencis nova batalo."

LA TASKO DE LA BOLŜEVISTOJ-LENINISTOJ.

Ni citis tiom da gazetcitiraĵoj por montri la tutan akrecon de la batalo en la lab.klaso pro la staĥanovmovado.Certe la staĥanovmovado ankoraŭ ne minacas la sovetiajn laboristojn per senlaboreco - la ŝturme kreskanta industrio povas provizore ĉiujn liberajn laboristojn enlaborigi - sed ĝi minacas lin per degradigo al helplaboristo,fizika troŝtreĉiĝo,salajromalaltigo ktp.La plua skismo en la laborista klaso signifas pliakriĝon en la ekonomia neegalo,k neharmonio.

Estas absurde,supozi,ke la plimulto aŭ eĉ nur granda parto de la lab. klaso povas fariĝi al staĥanovuloj.La kreskado de la salajroj de la staĥanovuloj estas jam nun faktoro netrankviliganta la burokrataron. Okupigante sin pri la stabiligo de la sovetia valuto,ĝi ne povas tiel malŝpari la rublon.Stalin malkaŝe deklaris ke oni devas transplori la hodiaŭajn normojn "kiel ne plu konformantajn al la realo". "Ili restis malantaŭe k fariĝis al malhelpaĵo.Necesas anstataŭigi ..lin per novaj pli altaj teĥnikaj normoj,"kiuj "ankaŭ necesas por alproksimigi la malantaŭe restintajn amasojn al la progresintaj".Tio estas sufiĉe klara.Ĉi tiuj novaj normoj devas,laŭ Stalin,"esti ie en la mezo inter la malnovaj k tiuj kiujn atingis la Staĥanov-oj k Busigin-oj."("Pravda",22-11)K la plialtiĝon de la teĥnikaj normoj sekvos certe baldaŭ plimalaltiĝo en la taksado,t.e.malaltiĝo de la salajroj. En aro da entreprenoj oni malaltigis la taksojn tuj post la unuaj rekordoj de la staĥanovuloj.Tion scias la sovetia laboristo,li serĉas vojojn por defendi sin k li protestas laŭ sia maniero kiel ni vidis el la donitaj faktoj.

Estas tre verŝajne ke ni staras en Sovetio antaŭ seriozaj ekonomiaj defendbataloj de la laboristoj.La batalo havos neeviteble,ĉiukaze en la komenco,disan,partisanan karakteron.La laborista klaso en Sovetio ne havas sindikatojn,sovetojn,partion.Ĉi tiuj tute degeneritaj